# KOMITATO-KUNSIDO

4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris - Métro Bastille

# dimanĉon la 13an de septembro 2020

---

### 0.1. Kontrolo de la ĉeestantoj kaj rajtigitoj

Dimanĉon la 13an de septembro 2020, de la 10:13a ĝis la 12:30a, kunsidis en Parizo la Komitato de Espéranto-France: [ĉeestas: S = fizike en la **s**idejo, R = **r**ete pere de Zoom]

| Persona nomo | Familia nomo | Mallong. | Komitataneco | Ĉeestas | Senkulp. | Forestas | Rajtigas |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Alex | ANDRÉ | AA | Repr. de la membraro | S | | | |
| Véronique | BICHON | VB | Repr. de la membraro | R | | | |
| Bernard | CORNEVIN | BC | Repr. de la membraro | | | X | |
| Bruno | FLOCHON | BF | Repr. de la membraro | S | | | |
| Xavier | GODIVIER | XG | Repr. de la membraro | R | | | |
| Vincent | JACQUES | VJ | Repr. de la membraro | R | | | |
| Jesper | JACOBSEN | JJ | Repr. de la membraro | | | X | |
| Maurice | JUY | MJ | Repr. de la membraro | R | | | |
| Alex | KADAR | AK | Repr. de la membraro | R | | | |
| Michael | LEIBMAN | ML | Repr. de la membraro | | X | | GT |
| Jean-Lucien | MAZEAU | JLM | Repr. de la membraro | S | | | |
| Claude | NOURMONT | CN | Repr. de la membraro | R | | | |
| Emmanuelle | RICHARD | ER | Repr. de la membraro | R | | | |
| Armand | SALEK | AS | Repr. de la membraro | S | | | |
| Eric | STREICHEMBERGER | ES | Repr. de la membraro | S | | | |
| Gilles | TABARD | GT | Repr. de la membraro | R | | | |
| Flora | MARKOV | FM | Repr. de FET | | | X | |
| Michèle | ABADA-SIMON | MAS | Repr. de FKEA | S | | | |
| Didier | JANOT | DJ | Repr. de GEE | R | | | |
| Lucas | TEYSSIER | LT | Repr. de JEFO | | X | | JLM |
| Jean-Pierre | BOULET | JPB | Repr. de fed. Auvergne | | | X | |
| Josette | DUCLOYER | JD | Repr. de fed. Bretagne | | | X | |
| Gilbert | STAMMBACH | AG | Repr. de fed. France-Est | | | X | |
| Marc | GIRAUD | MG | Repr. de fed. Paris-Île-de-France | R | | | |
| Florian | CEZARD | FC | Repr. de fed. Languedoc-Rouss. | | | X | |
| Gilles | TABARD | GT | Repr. de fed. Limousin | R | | | |
| Michel | DECHY | MD | Repr. de fed. Nord | | | X | |

| | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Marie-France | CONDÉ-REY | MFCR | Repr. de fed. Poitou-Charentes | | | X | |
| Pascal | VILAIN | PV | Repr. de fed. Provence | R | | | |
| | | | | | | | |
| | | | | | | | |

14 retaj partoprenantoj kaj 8 komitatanoj en la sidejo.
Ankaŭ ĉeestas en la sidejo SB kaj FLJ.

**0.2. Elekto de prezidanto kaj protokolanto** **5 min**

Matene prezidas JLM.
Protokolas AA kaj JLM.
Provlegas BF kaj ER.

10h21

**0.3 Definitivigo de la tagordo, eventualaj aldonoj** **5 min**

## 1. KUNORDIGO (administrado kaj financoj)

**1.1. Elekto de la nova estraro** **ELEKTO** **25 min**

JLM proponas ke ĉiu ĉe la sideja tablo aŭ sin prezentu aŭ proponu kanditaton al postenoj.

SB, MAS, MJ kaj AA proponas **Bruno Flochon** kiel **prezidanton**. Li kanditatiĝas kondiĉe ke estu vic-prezidanto kaj po du homoj je ĉiu posteno : prezidanto kaj vic-, kasisto kaj vic-, ktp.
**Maurice Juy** proponas sin kiel **vic-prezidanto**.
GT proponas **Emmanuelle Richard** kiel **sekretariino**.
**Eric Streichemberger** proponas sin kiel **vic-sekretario**.
**Jean-Lucien Mazeau** proponas sin kiel **kasisto**, espereble estos vic-kasisto.
**Armand Salek** proponas sin kiel **vic-kasisto**.
Bruno Flochon ŝatus ke estu ankaŭ plia membro en la estraro, kiu zorgu pri ERIK (eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado) kiel **informado (André AA)** kaj **vic-informado (Godivier XG).**
Timante ke li ne havos sufiĉe da tempo por dediĉi al tiu laboro, AA pretas helpi en tiu kampo nur kondiĉe ke li ne estus sola. Responde al tio, XG pretas esti en la posteno vic-informado.

***10:46** AK alvenas en la sidejo.*

Pro teĥnikaj kialoj, sekreta voĉdonado okazos posttagmeze per balotilo – XG zorgas pri tio.
Intertempe ĉiuj tiuj membroj estas

**1.2 Strategio kaj laborplano por la nova Komitato** **DISKUTO** **20 min (11h)**

Bruno Flochon parolas pri siaj ideoj rilate al la laborplano por 2020–2021.

**1. Kontakto kun la membroj** gravas.

1.1 Laŭ mi mankas regula **interŝanĝo** pri ideoj, voko de homfortoj ktp. Estus bone okazigi kolekton de tio komence de la jaro, tiel ke la membroj komprenu ke la asocio aŭdas ilin kaj komprenas ilin en la realigado de la ideoj.
1.2 Ankaŭ gravas **instruado**: reeldono de metodoj, kaj ankaŭ subteno de la lokaj instruistoj pere de staĝoj (Bouresse, Greziljono, …).

2. Ankaŭ **informado al la ĝenerala publiko** estus bone renovigi la informilojn kaj decidi pri informjara kampanjo, pensante pri celgrupoj. Ekz. pro la novaj lerniloj kiel Duolingo estas novaj lernantoj. BF proponas reokazigi la interasociajn seminariojn pri informado: kiel fari profesian afiŝon, kontakti la gazetaron, ktp.

3. **Renovigo de la agado**: organizo de debatoj, ke ĉiu havu la parolon, ke ni profesiigu la agadojn, eĉ se tio ne estas ĉiam facile por volontuloj. Ni havas ciferecajn rimedojn, ni uzu ilin! Duopo de homoj permesos malpli peza laboro. Ankaŭ laboro per komisionoj (informado, instruado, ktp.) multe helpos. Mi deziras ke ĉiu komitatano partoprenu en la asocio, do en ĉiu komisiono.
JLM: ja estas grave ke ĉiu sciu kiu partoprenas en kiu agado ene de la asocio. Pri la ciferecaj rimedoj Framatalk same bone funkcias kiel Zoom.
BF: estus bone kolekti la volojn de homoj hodiaŭ ĉe la tablo kaj en Zoom, kaj ankaŭ ne forgesi homojn kiuj ne hodiaŭ ĉeestis.
ER: ekzistas tabelaj dokumentoj kun komisionoj kaj homoj ene de ĝi. Povas esti bazo por krei novan ĝisdatan dokumenton.

MJ kaj XG: Estus bone ke ĉiumonate okazu estrara / komisiona reta kunsido por antaŭenigi la agadojn.
MJ: ekzemple en la komisiono pri Esperanto en la lernejojn ĉiam progresas la laboron ĉiumonate danke al regulaj video-kunsidoj inter la membroj.

JLM: agadoj "perfortaj" kiel tiuj de Vincent Jacques estas efikaj. Eble po unu "misio" ĉiujare?
MJ proponas ke VJ kunordigu la kontaktojn kun la gazetaro cele al apero de artikoloj, intervjuoj k.s.

FLJ: Pri informado estas urĝa demando. En la francilia asocio estis la demando ĉu partopreni en la instrua foiro fine de novembro. Ĉu ni havas sufiĉe da informiloj? En la ekzamenoj de FEI estus bone ke aperu parto pri "kiel informi?" kun konkretaj ekzemploj: kiel respondi al ĵurnalisto ktp.
JLM: tiu temo estos pritraktota poste en la tagordo.

VB: Pli gravas komisiaj kunvenoj ol komitataj kunvenoj. La komitataj kunsidoj povus esti la okazo ekscii tion, kio okazis por ĉiu komisiono.

### 1.3 Dato de la venonta kunsido. Ĉu oktobro aŭ januaro? DISKUTO 10 min

JLM: Kompreneble oktobro estas tre proksime. Kion vi opinias pri la semajnofino 2021-01-23/24?
kontraŭas: 0 sindetenas: 0 aprobajs: ĉiuj

BF: la komisionoj kunsidu sabaton la 2021-01-23an posttagmeze, kaj la komitato-kunsido dimanĉon 2021-01-24an ekde la mateno.
La sekretario sendu ĉirkaŭ la 2020-12-25an kunvokilon!

**1.4 Nova aliĝilo 2020-2021** **DISKUTO 15 min**

MJ: Laŭmemore DJ komencis prilabori la aliĝilon.
AK: la ideo de DJ komenci la laboron en januaro 2020 tiel ke la aliĝilo estu preta en septembro 2020 ja estis granda ideo!

Rimarkoj de JLM: en la aliĝilo estis la celoj de la agadoj de Klubo 2000, ekz. financado de videoj en YouTube.
BF: ni diskutu nun pri la proponoj de DJ. Ili estis la jenaj, **sen mencii "Klubon 2000"**, kaj ke la membroj povu mem elekti al kiu agadokampo la donacoj utilu:

**Dons aux associations – France***
Don à Espéranto-France ____________
Don à Espéranto-Jeunes ____________
Don pour la rénovation du siège ____________
Don pour la promotion de l'espéranto sur YouTube ____________
Don pour action d'information en enseignement primaire et secondaire ___________
Don pour l'envoi de livres et supports de cours en Afrique ____________

MJ: ni dividu la celgrupon en pli malgrandajn grupojn. Ekz. la komisiono pri Esperanto en lernejojn kontaktis la bazlernejojn, restas nun al ni kontakti bazajn mezlernejojn kaj post altajn mezlernejojn. Tio pli bonas ol informi unuope al la 12–30-jaraĝuloj.

**VOĈDONO :** 3 sindetenoj, 1 kontraŭas, aliaj akceptas. Ŝanĝoj aprobitaj**.**

**[Tagmanĝa paŭzo. La kunsido daŭros je la 14:00a.]**

**14:06 — BF prezidas la posttagmezan kunsidon.**

## 2. KONSCIIGO (projektoj, ERIK = Eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado)

### 2.1 Klubo 2000 por 2020-2021: kiuj temoj ? DECIDO 15 min

### 2.2 Apogo al eldono de la libro *Ruĝaj vojoj de Aŭrovilo* (GT+Ewa Grochowska) DECIDO 15 min

Ewa Grochowska (EG) estas membro de Espéranto-Grenoble-Alpes, estis kasisto. Ŝi deziras ke Peter Balasz eldonu libron (250p., 20p. koloraj) pri la vilaĝo Auroville en Barato – 200 ekzemplerojn: 1530 EUR. La vendo-prezo estas ĉ.12 EUR.
Demando de BF: kiel eblas havi reenspezon de mono post donaco de 500 EUR kiel partopreno? Al kiu iros la profito de la sendo?
GT: La eks-federacio Rhodan-Alpoj intencis iom doni monon al Espéranto-France.
EG: Kaj Peter Balasz kaj Grenoble vendos ilin.
BF: Ĉu ni havos kelkajn ekzemplerojn por vendi ilin?
EG: laŭ viaj kondiĉoj.
BF: la kultura/eldona komisiono pri eldonado devos do zorgeme konsideri tion antaŭ voĉdonado de la komitato.
CN: ni unue akiru informojn de Peter Balasz.
BF: 500 ÷ 1530 × 200 estas ĉ. 66 libroj. Do eble ni povus akiri tiun kvanton da libroj por vendi ilin. Povus esti unu el niaj kondiĉoj. Aliteme, ni Espéranto-France ne estas ligitaj de la decidoj de federacioj. Ni povas subteni aŭ ne, sed ne anstataŭigi federacion.
AA: mi iom konfuziĝas pri tiu afero, tamen akiri librojn konsekvence ke ni donacas monon povas esti ideo. Demando al ER: vi ofte sekvis eldonon de kelkaj libroj, ĉu vi havas vidpunkton?
ER: la riskoj ne estas klaraj. Kiu havos profiton? Ĉu Peter, eldonisto, Ewa, ni? Ŝajnas esti komuna eldono.
AA: ĉu la enhavo de la libro, aŭ almenaŭ skizo de ĝi, estus disponebla, tiel ke ni sciu tion, kio ni pretus kune eldoni?
GT: kiom da libroj estis eldonitaj en Pollando? Respondo: 1000, kaj 600 ekzempleroj estis venditaj.

BF: ni ne perdu tro da tempo. Ewa, bonvolu kontakti Petron, ni vidu skizon de la libro, kaj surbaze de ĝi se ĝi al ni plaĉas, ni povus akiri ⅓ de la kvanto kaj tiom kvante eldonu ĝin.

**VOĈDONO** pri la propono de Bruno: 0 kontraŭas, 1 sindetenas, aliaj aprobas.

### 2.3 Esperanto en Unesko kiel nemateria heredaĵo DISKUTO 10 min

FLJ: komisiono de UEA ĉe Unesko (mi, Barbara Despinez kaj Didier Loison) zorgas pri mondcivitaneco, eldono de la traduko al Esperanto kaj al la ĉina lingvo de libro pri la 70-jariĝo de Unesko, kaj ankaŭ pri nemateria kultura heredaĵo. En pluraj landoj Esperanto jam estas en la listo de kelkaj landoj (Pollando, Kroatio – kaj eble ankaŭ Slovakio, Svislando sukcesos).

BF: kion povas fari Espéranto-France rilate al tio?
FLJ: pristudi la dosieron.
MJ: kiel statas la dosiero?
FLJ: En Francio mi studis kiel antaŭenigi la dosieron. Devas esti la lando kiu petas al Unesko. Espéranto-France do povas nur *subteni* la francan komisionon.

MAB: Ĉu UEA laboras pri tio? — Respondo de FLJ: jes, mi kaj Barbara D. kaj Didier L.

BF: dankon pro viaj streĉoj, ni subtenas vin plu en la afero.

**2.4 Prelegvojaĝoj en nova formo** **DISKUTO 15 min**

CN havas ideon. Prelegvojaĝoj pruvis esti efikaj dum la lastaj jaroj: homoj el aliaj landoj montras utilecon de la lingvo. Kompreneble pro Kovim-19 ne facile eblas venigi alilandanojn. Kion do fari nun? La modernaj rimedoj donas al ni aliajn eblecojn. Ekzemple ĉi-somere MondaFest, malfermaj tagoj de asocioj, …
BF: tio vigligos kulturan komisionon, eble Yves Nicolas povos helpi.

**2.5 Partopreno en la foiro pri edukado (FLJ)** **DISKUTO 10 min**

FLJ: «Salon de l'éducation» okazos la 2020-11-25/29ajn. Tamen pro investo (ĉ. 1000 EUR de budo-luado) kaj bezono de materialo disdonenda al gelernantoj kaj homforto mi kaj Didier Janot kiu kutime partoprenas ambaŭ timas. Ĉu la asocio pretas pagi? Kaj kion transdoni?
AA: DJ kutime estas. Kion vi opinias?
DJ: la flugfolio *L'espéranto au lycée* taŭgus kiel dua informilo, por homoj kiuj interesiĝas, sed ne la aliaj: ili celas pli aĝaj homoj.
BF: la kalendaretoj ankaŭ taŭgas. Alia demando: Marc Giraud, vi reprezentas la francilian federacion, ĉu ĝi povas partopreni en la foiro?
MG: ne klaras ĉu la foiro okazos. Ni scias ne sufiĉe por scii ĉu indas partopreni.
AK&DJ: kutime la landa asocio Espéranto-France pagas la budon – 1200 EUR.

**VOĈDONADO**: Ĉu Esperanto-France pagu la budon kaj donu materialon por transdoni al la deĵorantoj ĉe la *Salon de l'Éducation*?
0 kontraŭas, 1 sindetenas, aliaj subtenas. Akceptita, kondiĉe ke la foiro okazas.

**2.6 Subvencipeto de Kosmo (AK)**

AK: Francesco Maurelli vidis ke ni havas komitato-kunsido, li transdonas informon: kutime Espéranto-Toulouse kaj aliaj asocioj partoprenas en projekto…? Mi proponas ke Espéranto-France arigu "komisionon" por diskuti kun Francesco kaj pritrakti la aferon. Jen la informoj:
Pro la kronvirusa pandemio, Eŭropa Unio lanĉis eksterordinaran alvokon en kadro Erasmus+ kun limdato je la 27a de oktobro, laŭ specifaj prioritatoj. En la universitata kadro, la alvoko celas fortigi retan edukadon. Por asocioj kiuj laboras en plenkreska edukado (kiel niaj E-asocioj), la ĉefa fokuso estas pri kreivo, arto kaj muziko – ĉar tiuj sektoroj estas inter la plej damaĝitaj pro la necesa enŝlosigo de la homoj, kaj sekva nuligado de plej multo da artaj programoj.

Kosmo planas labori al la jenaj projektproponoj:

- Arta kaj kultura edukado per reto. Tio aparte tuŝas organizojn kiuj estas aktivaj en la kultura kaj arta kampo, ekzemple organizas kongreson kun arta programo, aŭ mem estas art-fokusita organizaĵo. Preskaŭ ĉiu mez-granda E-asocio ja povas esti konsiderata en tiu ĉi difino, pro la organizado de kongresoj lokaj, naciaj kaj internaciaj kiuj ja proponas kutime buntan artan programon.
- Kreivo kaj entreprenado: tiu ĉi estas unu el la prioritatoj de la programo, kaj lastatempe montriĝis pli kaj pl  i da intereso pri entreprenado en Esperantujo kaj / aŭ per Esperanto.
- Reta edukado por universitatoj: pri tio ni aparte kontaktos universitatojn kiuj rilatas al Esperanto/interlingvistiko  La temoj laŭas la specifajn prioritatojn de la eksterordinara alvoko por projektproponoj.

Ni ŝatus enketi pri interesiĝo de Esperanto-France partopreni en tiaj projektoj.
Krom tio, kio rilatas al la limdato fine de oktobro, ni kompreneble ankaŭ interesiĝas pri pli longdaŭra kunlaborado por la nova EU-programkadro 2021-2027. Tamen pri ili ne estas ankoraŭ multe da informoj, sed se vi interesiĝas vi povas esti inter la unuaj kiujn ni informos pri la novaj eblecoj.  En Francio en la lastaj jaroj ni tre bone kunlaboras kun Tuluza Esperanto-KulturCentro. Ni pensas tamen ke bonas se foje ankaŭ la ĉefa nacia asocio partoprenu en tiaj projektoj, ankaŭ por esti rolmodelo por la lokaj filioj. Lastatempe UEA ankaŭ kon  […]

## 3. KOMUNUMO (kongresoj, ...)

### 3.1 Kongresoj de Espéranto-France 2021 kaj 2022 — DISKUTO 10 min

MJ: la kongreso 2021 okazos en Trélissac apud Périgueux en 2021. La aferoj glate iras. La dato estas Ĉieliro 2021: 2021-05-13/16aj.

BF: ĉu jam estas kandidatoj por 2022?
CN & AK: la Germana Esperanto-Asocio ŝatus iam kunkongresi kun Espéranto-France.
MAS: ĉu en Francujo aŭ Germanujo?
AK: Strasburgo aŭ apude. Eblas kontakti Andreas Diemel el la germana asocio.
BF: la estraro kontaktos kun li.

### 3.2 Reprezentanto de Espéranto-France en Greziljono — ELEKTO 10 min

FLJ: Devas esti iu el Espéranto-France por reprezenti la asocion en Greziljono. Antaŭe estis Didier Loison, sed li ne plu estas en la komitato. Ja gravas havi reprezentanton, ĉar nuntempe estas grave pritraktitaj projektoj, interalie tegmento kaj ĉambro por ruloseĝuloj.
BF: kiu pretus reprezenti la asocion el la komitato? Ĉu ni devas aperigi alvokon al reprezentanto?
FLJ: praktitke ni telefone kunsidas unufoje monate sed kelkfoje malpli. Daŭras unu vespero.
AK: ĉu ne estas defaŭlte la prezidanto de la asocio?
MAS, GT kaj AA apogas la ideon de BF, ke ne necese estas eĉ membro de la komitato. Povus esti komisiita homo.
FLJ: ja sufiĉas ke tiu homo povu paroli nome de Espéranto-France.

**Fino de la kunsido.**

XG: la rezultoj de la elektoj de la estraro per balotilo.org aperis :

**Bruno Flochon - prezidento**
La **“jes”** venkis per **100%** la “ne” (0%).
*Kvanto da voĉoj:* Jes: 15 Ne: 0 Sendecide: 0

**Maurice Juy - vic-prezidento**
La **“jes”** venkis per **85%** la “ne” (15%).
*Kvanto da voĉoj:* Jes: 11 Ne: 2 Sendecide: 2

**Emmanuelle Richard - sekretariino**
La **“jes”** venkis per **100%** la “ne” (0%).
*Kvanto da voĉoj:* Jes: 15 Ne: 0 Sendecide: 0

**Eric Streichemberger - vic-sekretario**
La **“jes”** venkis per **100%** la “ne” (0%).
*Kvanto da voĉoj:* Jes: 15 Ne: 0 Sendecide: 0

**Jean-Lucien Mazeau - kasisto**
La **“jes”** venkis per **100%** la “ne” (0%).
*Kvanto da voĉoj:* Jes: 15 Ne: 0 Sendecide: 0

**Armand Salek - vic-kasisto**
La **“jes”** venkis per **100%** la “ne” (0%).
*Kvanto da voĉoj:* Jes: 15 Ne: 0 Sendecide: 0

**Alex ANDRÉ - informado**
La **“jes”** venkis per **100%** la “ne” (0%).
*Kvanto da voĉoj:* Jes: 15 Ne: 0 Sendecide: 0

**Xavier Godivier - vic-informado**
La **“jes”** venkis per **100%** la “ne” (0%).
*Kvanto da voĉoj:* Jes: 15 Ne: 0 Sendecide: 0

Do, ĉiuj kandidatoj estis elektitaj.Gratulojn al ili !